



“BATALO KONTRAŬ PENSMANIERO”

“Kiam finiĝas la milito, la pensmaniero, kiu ebligis la aperon de la IŜ kaj similaj grupoj, daŭros, kaj tiun formalaperigi estos la pli granda defio”. Tiel resumis la respondeculo pri eksteraj rilatoj de la IPT la ĉefan defion, kiun havas la politika movado de Roĵavo pli for de la milita batalo kontraŭ la Islama Ŝtato. Kaj, pli konkrete, tiun de la roĵava feminisma movado. Dum la lastaj jaroj, en okcidento famiĝis la Inaj Protekt-Taĉmentoj, la virinoj, kiuj agis en la lukto kontraŭ la IŜ. Tamen, ne estas tiom konata, ke la IPT havas civilan branĉon, tiom grava kiom la milita. Fakte, la IPT ne nur donas armilajn trejnadon, ĝi ankaŭ prilaboras la ideologian kampon, ĉar la lasta celo estas atingi sendependajn inojn.

La IPT-milicianoj estis gravegaj en la batalo por la defendo de Kobano inter 2014 kaj 2015. Pasintjare, tiu urbo de Roĵavo interfratiĝis kun Durango, ĉar ambaŭ suferis bombadon dum ties militoj. La Urbestro de Durango kaj la neregistara organizo *Suargi* monhelpis la virinan akademion de Kobano, kaj tiun ĉi someron grupo da durangaj virinoj estis en Kobano por koni tiun ĉi projekton kaj aliajn diferencajn. La organizitaj virinoj de Kurdio klarigis al ili la regularon kreitan por malpermesi la poliganion, la hejman perforton kaj la geedzigon de neplenaĝuloj, kaj ankaŭ la strebojn por potencigi, lertigi kaj politike transformi la inojn en aktivajn subjektojn.

Unu el tiuj revoluciaj projektoj estas la vilaĝeto Ĵinuaro⁽¹⁾, “la vilaĝeto de la liberaj inoj”. Ili utiligis kelkajn terparcelojn de la siria ŝtato, kaj ili estas nun ĝin konstruantaj. Tamen, la rezulto de ilia strebo videblas, kaj ili jam elkonstruis kelkajn loĝejojn. La celo estas havigi lokon al inoj divorcintaj, al tiuj, kiuj suferis hejman perforton aŭ al tiuj, kiuj volas vivi for de la patriarĥa socio.

Krom la feminismon, la vilaĝeto havas aliajn fundamentojn; ekzemple, la ekologion kaj la demokratian konfederaciismon. La ekologiaj ideoj speguliĝas en la konstrulaboroj. Fakte, anstataŭ uzi cementon kaj ŝtalon, en Ĵinuaro oni produktas adobojn kaj prilaboras lignaĵojn.



Germana volontulino raportis, ke ĝis nun nur estas tri-kvar fiksaj loĝantoj, sed ili estas en kontakto kun la ĉirkaŭaj vilaĝoj, por plifirmigi la rilatojn. Komence, kelkaj najbaroj esprimis sian intencon matrikuligi siajn gefilojn en la lernejo, por ke ili ricevu egalecan edukon.

La loko, krom domojn, havos du lernejojn, centron por naturisma medicino kaj komunan kuirejon. La plejmulto estas jam preskaŭ konstruitaj. Cetere, estas du okulfrapaj elementoj. De unu flanko, la bunkro sub la kuirejo. Tio memorigas, ke kaj en Sirio kaj en Roĵavo estas milito kaj ke povas okazi atakoj kaj bombadoj. Aliflanke estas la naĝejo, kiun oni konstruis. La germana volontulino ridetante klarigis, ke en Sirio la arabaj virinoj ne havas naĝejojn, sed ke en Ĵinuaro ili havos unu, se ili volos sin bani.

La IPT-milicianinoj estas internacie konataj, sed ĝi ne estas la nura ina armita organizo. La grupoj de la *Asayîsh Jin* zorgas pri la deliktoj kontraŭ virinoj kaj ilia sekureco. Tial, nur inoj membras en ĝi.

Ĉar la membroj estas ligitaj al iu komunumo, la rilato kun tiu ĉi tre gravas, kaj, tial la volontuloj bezonas la permeson de la komunumo por aliĝi al la grupo – ĉiu komunumo respondas al strato, kvartalo aŭ vilaĝo—. Interalie, ili intervenas en kazoj de hejma perforto aŭ aranĝas la sekureckontrolojn. Tiaj sekureckontroloj abundas en Roĵavo, sed la membroj de *Asayîsh Jin* deĵoras en ili nur matene, pro familiaj kaŭzoj. La organizo naskiĝis en Kamjŝlo(2) kaj disvastiĝis iom post iom al la tuta Roĵavo. La respondeculo de la kazerno agnoskis, ke la komenco estis malfacila, ĉar por la socio estis fremda la bildo de armita virino, same kiel la ekzisto de policistinoj.

Virina televido

La feminisma revolucio ankaŭ influis sur la amaskomunikiloj, kaj la 3-an de junio komencis emisii *Jin TV*, la televido de la virinoj. Ĝis nun, oni emisias per interreto por Mezoriento kaj per satelito por Eŭropo. La projekto produktas kaj distribuas programojn por virinoj faritajn de virinoj. La ĉefa sidejo estas en Eŭropo, sed oni havas oficejojn en arabaj kaj kurdejoj de Sirio, kaj, konsekvence, oni emisias per la lingvoj de ambaŭ komunumoj, helpe de subtekstoj. Ĝenerale, la intenco estas montri la partoprenon de la inoj en la socio, jen en la politiko, jen en la kulturo. Tio jes, ne el la vidpunkto de la viroj, sed laŭ la maniero decidita de la inoj.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

(1) Jinwar.

(2) Qamîshlo.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Aitor Aspuru.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 15-an de Septembro 2018-a.

Tradukis: NXC. Novembro 2018-a. Provlegis: DS.

